

# *La Riverego*

Somero de 1998

Esperanto-Societo Kebekia

N<sup>o</sup>51<sup>a</sup>, Jaro 13<sup>a</sup>

## Nia biblioteko

Michel Clément

**E**n la laborplano de UEA por la Kampanjo 2000, oni povas legi, ke la estraro instigas nin savi la esperantaĵojn: « Prizorgi kaj savi historie valorajn esperantaĵojn en bibliotekoj kaj muzeoj ». Modeste, nia malgranda biblioteko entenas nur 332 librojn kaj 221 diversajn dokumentojn kiel revuojn, gazetojn, ktp, sed estas nepre grave konservi kaj katalogi tiujn-ĉi historiajn atestantojn.

Fakte, krom kelkaj libroj kaj revuoj, la kolekto maljuniĝas; male, ni havas la privilegion posedi kelkajn rarajn dokumentojn kiel *La matematika terminaro kaj kretomatiko* (1905) de Raoul Bricard, *Teorio pri evolucio de kono* (1909) de Nadina Kololvrat, *La question de la langue internationale et sa solution par l'esperanto* (1897) de Gaston Moch, k.a. Ni scias ke la esperantistoj, ekde la komenciĝo de la movado, tradukis klasikaĵojn; tiel, ni posedas tradukadojn de B. Brecht (*Trigroŝa romano*), Jose Hernandez (*Martin Fierro*), G. Leibniz (*Monadologio*), B. Prus (*La faraono*), Molière (*Don Juan*), Shakespeare (*La komedio de eraroj*), k.a. Plue, multaj esperantaj originalaj verkistoj estas reprezentitaj kiel: Auld, Baghy, Boulton, Drezen, Kalocsay, Lapenna, Piron, Privat, Ŝtimec, Waringhien, Zamenhof. Ni ne forgesu, ke ni ricevis multajn librojn el

kelkaj donacantoj kiel P<sup>ro</sup> Pierre Collinge (*La Riverego*, vintro 1997-1998), Harry Finemann kiu verkis *La Esperanto-juda kaj juda-esperanto vortaro* (legu la artikolon de Paul Ronald en *La Riverego*, printempo 1998) kaj eminentaj membroj de la

Esperanto-Societo Kebekia.

Ĉu mi povus proponi al la estraro de la Societo oficiale nomi nian kolekton, la *Biblioteko Collinge-Finemann* rilate la elvokitaj kialoj kaj cele al konstruo de ponto inter la pasinteco kaj la nuntempo?

## Un congrès pour vous !

Normand Fleury

Dans moins d'un mois, des espérantistes du Nord, du Sud, de l'Est et de l'Ouest de l'Amérique du Nord seront à Montréal pour prendre part au Congrès nord-américain d'espéranto.

Au programme : des conférences diverses, des groupes de discussion, un grand concert du groupe folk néerlandais *Kajto* (musique et chansons), de la poésie, un banquet, des visites guidées du « Vieux » et d'une micro-brasserie, et bien plus.

Si vous êtes débutant, vous découvrirez à quel point les espérantistes sont des gens  
**suite...**

## Ĉu vere vi ne aliĝis ?

Normand Fleury

Pripensu ke la *Nord-Amerika Kongreso de Esperanto* okazos en Montrealo fine de julio. Ĉu vere vi ne volas renkonti esperantistojn el plej diversaj lokoj en Usono. (jam aliĝis pli ol 40 Usonanoj) kaj krome juna Bulgaro kaj ankaŭ esperantistoj el NovSkotio, Ontario, Brita Kolumbio kaj eĉ 2 el Saganio ?

Ni ne povas tuj plene prezenti al vi la programon sed ĝi ja estos varia. *Kajto*, fama Nederlanda kvaropo, muzikos kaj kantos en Esperanto, unika okazaĵo en Ameriko. Se vi ŝatus prelegi, gvidi grupeton tra Montrealo, helpi en la organizado, tuj tuj kontakti min.

Ne maltrafu la okazon ĉar ja tia kongreso malofte okazas en Montrealo.

Respondilo/faksilo : (514) 272-0151, telefono : (514) 495-8442, rete : <esperanto@sympatico.ca>

### ...Un congrès...

amicaux, intéressants et chaleureux ; si vous n'êtes plus débutant, vous savez déjà à quel point les espérantistes sont amicaux, intéressants et chaleureux ; et si vous êtes un pro de l'espéranto, vous avez sûrement de nombreux amis espérantistes intéressants et chaleureux que vous aimeriez revoir et vous voulez en connaître de nouveaux !

Ne manquez pas l'occasion de *vivre* en espéranto pendant trois jours !

Inscrivez-vous rapidement au congrès qui se tiendra à l'Auberge du Parc, 5500, rue Sherbrooke Est, à Montréal (métro de l'Assomption) du 24 au 27 juillet prochain. Des formulaires d'inscriptions (en espéranto) sont disponibles au (514) 272-0151 (répondeur/télécopieur) ou <esperanto@sympatico.ca>

La loka asocio *Esperanto en Cis-Valo*, kiu agadas en centra Francio, estis petata doni la liston de siaj membroj kun adresoj. Pro rifuzo, la vicurbestro pri kulturaj aferoj rifuzis prunti salonon por prelego de ukraina samideano. La ajna enslipigo de konvinkoj estis neebbla. Tiu asocio plendis ĉe diversaj ŝtataj instancoj, kiuj finfine apogis ĝin. La urbeŝtaro nuligis siajn postulojn, kaj devis detruji ĉiujn posedatajn sliparojn.

Tio estas grava venko por protektado de individuaj liberecoj kaj de asociaj garantioj, almenaŭ en Francio.

Dankon al ĉiuj individuaj kaj grupaj subtenintoj.

ESPERANTO EN CISVALO

88 rue Victor-Hugo

FR-37 400 AMBOISE

a.reto@france-association.com

# Ĝenerala kunsido

La ĝenerala kunsido de la Esperanto-Societo Kebekia okazos dimanĉon 26an de julio de 1998, okaze de la Nord-Amerika Kongreso de Esperanto, en Auberge du Parc, 5500, rue Sherbrooke Est, en Montrealo, ekde la deka horo.

## Tagordo

0. Malfermo ; elekto de kunvenestro kaj de protokolanto ; akcepto de la tagordo ; akcepto de la protokolo de la lastjara kunsido.

1. Raporto de la estraranoj.

2. Venonta agado.

3. Fermo.

## 11 111 subskribis la Manifeston de Prago

La nombro de subskriboj por la Manifesto de Prago atingis *rondan* ciferon la 15<sup>an</sup> de majo, ĉar en tiu tago la Centra Oficejo de UEA registris la 11 111<sup>an</sup> apoganton.

En sia aprila kunsido la Estraro de UEA trovis tre pozitiva la daŭran kolektadon de subskriboj. Ĝi estas efika maniero por diskonigi la enhavon de la Manifesto kaj proksimigi ĝin al la esperantistoj. Tio kontribuas al unu el la ĉefaj celoj de Kampanjo 2000 : levi la idean nivelon de la Esperantomovado. Tial la Estraro instigas ĉiujn

organizaĵojn kaj unuopulojn plu kolekti subskribojn. La Centra Oficejo de UEA volonte disponigas tiucele poŝtkartojn kun loko por 5 subskriboj kaj foliojn por 20 subskriboj.

Por helpi al tiuj, kiuj deziras pli profunde studi la enhavon de la Manifesto, UEA preparas studkajeron kun artikoloj pri ĉiuj sep tezoj de la Manifesto. La kajero estos uzebla por memstudado sed ĝi aparte taŭgos kiel enkonduko por diskutoj ekz. en kluboj kaj Esperanto-aranĝoj. Ĝi estos lanĉita en la UK en Montpeliero. [ El *Interredaktore* ]

*La Riverego (Le fleuve)* est publiĉe par la Societ e qu eb ecoise d'esp eranto en mars, juin, septembre et d ecembre. D ep ots l egaux : biblioth eques nationales du Canada et du Qu ebec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilit e des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopi e   110 exemplaires sur papier recycl e. Gratuit pour les membres de la S.Q.E. Autrement, l'abonnement annuel est de 10 \$.

*La Riverego* estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia en marto, junio, septembro kaj decembro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la a toroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotkopiita 110<sup>okazoj</sup> sur reuzpapero. Senpage por la membroj de E.S.K. Por aliaj, la jara abono kostas 10 CAD. UEA-kodo de la Societo : kebk-d.

** ch ance pour le prochain num ero / limdato por la venonta numero : 1998.09.01.**

R edacteur / redaktis : Sylvain Auclair. Ont collabor e   ce num ero / kunlaboris al  i tiu num ero : Suzanne Bolduc, Michel Cl ement, Normand Fleury kaj Zdravka Metz. Administrateurs de la S.Q.E. / estraranoj de E.S.K. : Normand Fleury (pr esident / prezidanto), Sylvain Auclair (vice-pr esident / vicprezidanto), Jessy LaPointe (secr etaire-tr esorier / sekretario-kasisto), Zdravka Metz kaj Yvon Roux.

**Esperanto-Societo Kebekia / Societ e qu eb ecoise d'esp eranto**

6358-A, rue de Bordeaux

Montr al Qu ebec H2G 2R8

R epondeur et t el ecopieur / telefonrespondilo kaj telekopiilo: (514) 272-0151

esperanto@sympatico.ca

http://www3.sympatico.ca/esperanto

# La dua afero de Zamenhof

## Homaranismo

Michel Clément

**E**n siaj leteroj, Lazaro Zamenhof nomis la esperantan agadon « nia afero », kiam li esprimis opiniojn pri la lingvo, la internaciaj kongresoj, ktp. Tial, ni scias, ke la Majstro laboris dum multaj jaroj pri religiaj demandoj. Lia respondo estis unue la Hilelismo kaj poste la Homaranismo.

Doktoro Lejzer Ludoviko Zamenhof (1859-1917) naskiĝis en eta rusa/pola urbo Bjalistoko, kiu entenis, laŭ André Cherpillod, 16544 loĝantojn, el kiuj 68 % estis judoj. Do, li lasis sin tuŝi de la dramo de sia popolo ĉar la judoj suferis multe pro rusaj kaj polaj pogromoj el la fino de la deknaŭa jarcento ĝis 1905.

Tiel, li intense studis tiujn problemojn de 1900 ĝis 1917 ; li verkis *Alvoko al la juda intelektularo* (1900) kaj *Hilelismo* (1901) ĉar li volis respondi al la juda intelektularo pri la problemo inter la hebrea religio kaj la juda kulturo. Fakte, li priskribis en tiu-ĉi libro tiujn, kiuj proponis hebrean religion kaj la cionismon por la estonteco de sia popolo. Li konkludis, ke cionismo estis tiam por la juda popolo danĝera iluzio, ke estas forjetenda la asimilado, kaj ke la hebrea religio devis esti tute reformata krom ĝia etiko. Tiuj-ĉi proponoj estis akceptitaj nek de la intelektularo nek de la kelkaj rabenoj kiuj legis lian tekston. Laŭ la Majstro, la kerno de la hebrea etiko devenus el la saĝulo Hillel (li vivis en la unua jarcento, santempe kiel Jezuo), kiu diris tiun-ĉi faman frazon « Agu kun aliaj, kiel vi deziras ke aliaj agu kun vi ». Li aldonis al siaj pripensoj, post kelkaj jaroj, la tre riĉan tekston kiun li titolis *Dogmoj de hilelismo* (1906).

Zamenhof celis instali la kuntekston por estigi la « neŭtrale-homan

popolon » ; tiu projekto estis nomita *Homaranismo* kaj li planis starigi templon en Svisio, alvoki kunvenon aŭ sinodon, komponi himnojn kaj verki preĝojn similajn al la *Preĝo sub la verda standardo* (1904) kiu estis legata de Zamenhof en la Unua Kongreso (Boulogne-sur-Mer, 1905). Unu el ties elementoj jenas : « (...) Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj, Ni ĉiuj de Di' estas filoj ! » Tiu-ĉi stranga nomo, Homaranismo, kaj doktrino estis pli ol simpla etiko sed ne estis nova kredo. Ne temis por li, kontraŭigi al kristanismo nek al aliaj religioj aŭ kredoj, sed donaci al la mondo la

### Scienca premio

Stefan Maul

FAME-fondaĵo por stimulado de internaciaj kompreniloj por la unua fojo distingis fakulojn per sia nova scienca premio kun sumo de 3000 germanaj markoj. Ricevas la premion la Esperanto-Societo de Ĉikago kaj la grupo de sciencistoj, kiu ellaboris la verkon *Ĝenerala, Organika kaj Biologia Kemio*.

FAME-prezidanto Stefan Maul komentas : « FAME ankaŭ en sia ĝenerala akcelado subtenas kaj sciencajn kaj evoluhelpajn projektojn. Ĝuste laŭ tiu ĉi aspekto la laboro de tiu grupo meritas la distingon, ĉar ilia laŭdeklara celo estas, per tiu fundamenta verko helpi precipe al studemaj gejunuloj en malpli evoluintaj landoj. »

Transdono de la premio okazos dum la Universala Kongreso en Montpellier, kadre de la Kongresa Universitato. [ El *Interredaktore* ]

riĉaĵojn de unu juda universala spirito por konstrui pontojn inter aliaj religioj kaj kulturoj. Iom antaŭ sia morto, Zamenhof verkis la definitivan tekston, *Homaranismo* (1917), pri sia idealo. La unua artikolo estas jena : « Mi estas homo, kaj la tutan homaron mi rigardas kiel unu familion ; la dividitecon de la homaro en diversajn reciproke malamikajn gentojn kaj gent-religiajn komunumojn mi rigardas kiel unu el la plej grandaj malfeliĉoj, kiu pli aŭ malpli frue devas malaperi kaj kies malaperon per vojo natura kaj sen perforteco mi devas akceladi laŭ mia povo ».

### Nova retgazeto mal-seriozas

Je la retadreso <<http://esperanto.nu/male/>> ekaperis *Male*, kiu skribas « malaktuale kaj malinterese pri movadaj mal- kaj okazoj ». En unu artikolo ĝi malkaŝas la veron malantaŭ la onidiroj, ke la usona spiona organizo CIA siatempe interesiĝis pri UEA kaj la esperanto-movado ĝenerale. Alia artikolo prezentas la plej novan kaj ambician projekton de esperantejo — meze de la Alpoj ! Ŝokos la legantojn la informo, ke fraŭlino Barlaston misuzas sian titolon ne plu estante fraŭlino. Nur *Male* havas la detalojn !

(Sub)fosante profunde, *Male* promesas pliajn malkovrojn, i.a. la ekinteresiĝon de la programejo Microsoft pri la internacia lingvo. Baldaŭ kaj nur en *Male* ! [ El *Interredaktore* ]

# Un cours de chimie

Sylvain Auclair

De nombreux francophones ont tendance à inventer des mots espéranto en ajoutant la finale adéquate au mot français correspondant. Ça marche souvent, mais pas toujours. Je pensais à cela quand j'ai lu un compte-rendu de la soirée scientifique qui a eu lieu chez

Sylvain Quirion. On y parlait, si je me rappelle bien, de *sodio*. C'est une erreur.

Ceux qui ont appris les sciences, même un tout petit peu, savent que les abréviations données aux éléments chimiques proviennent de leur nom

latin. Or les noms espéranto de ces éléments proviennent aussi le plus souvent du latin.

Beaucoup ressembleront donc au français, descendant du latin : *hidrogeno*, *oksigeno*, *fero*, *argento*, *oro*, *aluminio*, *plumbo*, *nikelo*, *magnezio*, *neono*, *radono*, *urano*. D'autres sont différents des mots français, mais ressemblent aux mots latins et donc aux abréviations chimiques : *nitrogeno* (azote, N), *natrio* (sodium, Na), *kalio* (potassium, K), *sulfuro* (soufre, S), *hidrargo* (mercure, Hg), *stibio* (antimoine, Sb), *stano* (étain, Sn).

Malheureusement pour les chimistes, le souci phonétique de l'espéranto fait que plusieurs noms d'éléments ressemblent par la prononciation mais diffèrent par l'écriture de leurs équivalents latins, ce qui fait que les lettres composant l'abréviation ne se retrouvent plus dans le mot espéranto. Par exemple : *kloro* (chlore, Cl), *karbono* (carbone, C), *kalcio* (calcium, Ca), *kupro* (cuivre, Cu), *ksenono* (xénon, Xe), *kromo* (chrome, Cr), *fosforo* (phosphore, P), *jodo* (iode, I), *oro* (or, Au) et *volframo* (tungstène, W).

## NOREK 1998

De la 29<sup>a</sup> ĝis 31<sup>a</sup> de majo okazis en Olympia, registara sidejo de la ŝtato Vaŝingtonio, la ĉi-jara Nord-Okcident-Regiona Esperanto-Kunveno.

Venis esperantistoj de Kanado (5 el Victoria, 2 el Vancouver), Kalifornio (3 de apud San-Francisco), Oregono (3 de Portland) kaj, jes, iom (16 ?) de Vaŝingtonio por partopreni riĉan programon. Ĉi tiu inkluzivis konatĝ-vesperon (vendredon vespere), prelegojn pri oceana ekologio (sabaton matene), kurson por komencantoj (sabaton matene), gviditan ekskurson

en la parlamentejo de Vaŝintonio (sabaton posttagmeze), bankedon (sabaton vespere), aŭkcion de esperantaĵoj (dimanĉon matene) kaj kantadon pri la maro (dimanĉon matene).

Rimarkante ke kongresumado en Kanado estas nuntempe pli bonpreza, klubanoj de Victoria invitis la sekvan NOREK-on al Sidney (kiel en 1996) kaj esperas ke venos multaj kanadaj esperantistoj. [ El la *Reta bulteno de KEA* 4.10 ]

## Al kiu E-renkontiĝo vi vojaĝos ĉi-somere ?

Laŭ ĉiuj disponeblaj fontoj (gazetoj, aliĝiloj ktp) ni regule kompilas « Plenan Kalendaron de Esperanto-Aranĝoj » (dato, nomo, organiza adreso, retroŝta adreso). Se la aranĝo havas propran retpaĝon, ni faras ligan al ĝi.

La liston ni aktualigas ĉiun 2<sup>an</sup>-3<sup>an</sup> semajnon, do ĝi estas ne nur unufoje, sed daŭre aktuala !!!

Se vi havas plenan aliron al interreto, la paĝojn vi trovas ĉe la adreso <http://www.hungary.net/esperanto/> aŭ ĉe <ftp://ftp.hungary.net/pub/esperanto/kalendar.txt>

Se vi havas nur retroŝtan konekton, sendu mesaĝon al la adreso [kalendaro@esperanto.org](mailto:kalendaro@esperanto.org) (ne gravas la temo kaj enhavo) kaj la aŭtomato sendos al vi la aktualan version de la Plena Kalendaro en TXT formato. [ El *Interredaktore* ]

### Plumbistoj ?

Pour finir : j'ai souvent entendu traduire *plombier* par *plumbisto*. J'espère que ces gens ont tort, et qu'il n'y a pas de plomb dans les tuyaux acheminant l'eau que je bois. Le nom vient sans doute du fait que l'on utilisait autrefois le plomb pour les tuyaux. On croit d'ailleurs que l'empoisonnement au plomb est une des causes de la chute de l'Empire romain ; le plomb est en effet toxique et s'accumule dans les tissus, entre autres dans le cerveau.

Puisque le travail des plombiers concerne les tuyaux, *tuboj*, pourquoi ne pas dire plutôt *tubistoj*.

# Finigis nekutima kurso

Zdravka Metz

**K**var studentoj komencis E-kurson la 10<sup>an</sup> de marto laŭ Metodo 12, kiu estas daŭriga kurso. Ilia nivelo pri Esperanto estis malsama. Bernard lernis ĝin dum 6 jaroj, sed ne praktikis, Michel studis per komputilo pere de la reto, Yanick havis semajnfinan kurson, sed nenion pli poste, David estis vera komencanto sed jam trian jaron studas latinan en lernejo kaj samtempe kun ĉi kurso uzis hejme la Zagreban metodon. Al la kurso aliĝis Damir kaj Mira, denaskuloj, por ke la konversacia parto de la kurso estu pli aktiva, kaj meze de majo Monique eksciis pri Esperanto kaj volis ceesti nur por aŭskulti.

Mi gvidis kurson uzante preskaŭ ciam esperanton kaj tio multe helpis la progreson. Jam post la kvina leciono, por la unua fojo estis organizitaj renkontiĝoj kun unuopaj, spertaj Esperantistoj. Do, ĉiumerkrede post la hora leciono okazis renkontiĝo kun alia persono, kiu prezentis sin per iu sia intereso aŭ emo kaj konatiĝis kun la kursanoj. La celo estis plia kono de la persono, kiun oni povus poste vidi ĉe klubejo kaj pli facile estos por komencanto ekparoli kun tiu esperantisto.

Ĉi-foje mi, nome de la grupo volas danki al ĉiuj kiuj donacis al ni liberan tempon kaj venis renkonti kursanoj. Ni malkaŝu al vi ankaŭ tiujn nomojn.

Johano Sorel, kiu krom pri sia vojaĝemo kaj aventuroj dum kongresoj, malkovris al ni kiel li legas kaj skribas lerte per brajla alfabeto — literoj faritaj per diversmaniera kombino de pikitaj punktoj.

Patriko Mongeau, organizanto de la Papaga servo, ĝojigis ĉiujn per hejme bakitaj kuketoj.

Paŭlo Ronald, montrante skoltan triangulan tukon kaj vortareton amikan por olimpiaj ludoj en Montrealo, rakontis pri la skolta movado kaj pri sia volontulado kaj strebado kunigi la du movadojn — skoltan kaj esperantan.

Daniela Bédard venis kun Rumeno, 4-jara, kiu ride respondadis en esperanto. Ŝia iama neforgesita impreso ke Damir kaj Mira parolas la lingvon instigis ŝin esperantigi sian filon.

Renkontiĝo kun montrealaj Esperantistoj kaj komuna manĝo havis tamen vesperajn stelojn. Greg, esperantisto el Britio, kaj Eveline, estis tre ekscititaj pro unutaga sperto en malliberejo pro publika manifestacio kaj iliaj rakontoj pri la policanoj estis temo de la vespero.

Damir estis ankaŭ invitito de unu vespero kaj li proponis al ni spekti vidbendon pri la IJK en Montrealo. Ni vidis Damiron kaj Miran ankaŭ ĉe malferma kaj ferma spektaklo de IJK kaj de tiam ili duoble grandiĝis. Por ĉiuj estis aparte amuza la rakonto de Andrej, en kiu rolis pli ol dudeko da kongresanoj.

## Adieu à Martin Lavallée

Beaucoup de membres de la Société ont eu l'occasion de connaître l'étrange Martin Lavallée, jusqu'à récemment trésorier de la Société et responsable du service de librairie de l'Association canadienne d'espéranto, à Montréal.

Le jeune Martin s'est intéressé à l'espéranto il y a plus d'une dizaine d'années. Puis, tout d'un coup, il s'est mis à faire chez les espérantistes la propagande d'un projet moribond de langue internationale, l'*interlingua*, allant jusqu'à louer l'ancienne case postale de la Société et à copier le nom (en le traduisant) et la mise en page de *La Riverego*.

Erreur de jeunesse, nous étions-nous dit. Nous avons pensé l'expulser de la Société, mais il n'est n'était déjà plus membre.

Et quand il a semblé vouloir revenir à l'espéranto, nous pensions qu'il avait compris. Puisqu'il étudiait au cégep en

Jean-Claude Bélanger estis la lasta gasto kaj nature li kunportis notojn por kantigi al la kursanoj du kantojn. Li montris siajn du nove eldonitajn muzik-librojn kun tradiciaj francaj kantoj por kiuj li, kiel komponisto, preparis muzikan arangon. Tio okazis hieraŭ, la 10<sup>an</sup> de junio kiam ni ricevis surprizan telefonvokon de Tomaso el Usono. Ĉiuj povis aŭskulti lin, kiu jus revenas de Eŭropo, kie li kaj lia edzino uzis Pasportan Servon. Li miris kiel Eŭropanoj flue parolas. Liaj spertoj ĉe tri familioj stimulis ankaŭ lin kaj la edzinon enskribiĝi kiel gastigantoj. Tio estis kvazaŭ ĉerizo sur glaciaĵo, ĉar liajn impresojn ĉiuj povis ne nur aŭdi sed tre bone kompreni.

Jes, la kurso estis nekutima kaj kiel organizanto kaj gvidanto mi estas feliĉa kaj kontenta. Kursanoj parolas, tio ja estis la celo kaj ankaŭ vi povos renkonti ilin dum NAKE en Montrealo.

techniques administratives, on lui a confié les deux postes mentionnés plus hauts. Or jamais les finances de la S.Q.E. auront-elles été tenues avec si peu de compétence.

De plus, Martin fait maintenant la propagande de l'*ido*. Il a monté des sites web sur cette langue, qu'il présente comme de l'*espéranto amélioré*, ce qui fait qu'une recherche à partir du mot-clé *espéranto*, sur la *Toile du Québec*, amène plus de références sur l'*ido* que sur l'espéranto !

En conséquence, le conseil de la Société a cette fois-ci expulsé Martin. Jessy LaPointe est dorénavant notre secrétaire-trésorier. Le service de librairie est géré par une équipe sous la direction de Zdravka Metz, qui est récemment redevenue administratrice de la Société.

# Kalendaro de venontaj okazaĵoj

24<sup>a</sup> ĝis 27<sup>a</sup> de julio. **Nordamerika Kongreso** de Esperanto, en Montrealo.

1<sup>a</sup> ĝis 8<sup>a</sup> de **aŭgusto**. **Universala Kongreso**, en Montpeliero (Francio). Temo : *Mediterraneo — ponto inter kulturoj*.

16<sup>a</sup> de aŭgusto. Kunveno kaj ludado en **parko Mont-Royal**. Renkontiĝo je la 14h, ĉe la domo apud la Lago de l' Kastoroj.

18<sup>a</sup> de **septembro**. Vagado **laŭ strato Saint-Denis**. Renkontiĝo je la 19h, angule de l' strato S'-Denis kaj de la avenuo du Mont-Royal.

10<sup>a</sup> ĝis 12<sup>a</sup> de **oktobro**. **OKEMO**, en Ludlow (Vermonto, Usono)

23<sup>a</sup> de oktobro. **Kluba renkontiĝo**, ĉe Ivano kaj Daniela, 7122, rue Fabre, app. 1 (metrostacio Fabre), (514) 523-1604. Temo : *sensukeraj desertoj*.

13<sup>a</sup> de **novembro**. **Kluba renkontiĝo**, ĉe la Montreala Esperanto-Domo, 19h30.

20<sup>a</sup> de novembro. **Kluba renkontiĝo**, ĉe Patriko, 1043, av. Pratt, Outremont (metrostacio Outremont), (514) 341-3449. Temo : *kiel iĝi riĉa*.

27<sup>a</sup> de **decembro** ĝis 3<sup>a</sup> de **januaro de 1999**. **42<sup>a</sup> Internacia Seminario**, en Kassel (Germanio). Temo : *Dependeco : faktoj, sekvoj, solvoj*.

13<sup>a</sup> ĝis 16<sup>a</sup> de **majo**. **Printempa Renkontiĝo**, en Eijsden/Mesch (Nederlando). Temo : *Eŭroregionoj*.

31<sup>a</sup> de **julio** ĝis 7<sup>a</sup> de **aŭgusto**. **Universala Kongreso**, en Berlino (Germanio).

**Somero 2000**. **Universala Kongreso**, en Tel-Avivo (Israelo).

**Somero 2001**. **Universala Kongreso**, en Zagrebo (Kroatio).

Ni plezure respondos demandojn pri la supraj (kaj aliaj) okazaĵoj : (514) 272-0151.

## UEA en pli forta pozicio ĉe Unuiĝintaj nacioj

La aktivado de UEA pri eksteraj rilatoj ricevis gravan rekonon fine de junio, kiam la Komisiono pri Neregistaraj Organizaĵoj (NRO-j) de la Ekonomia kaj Socia Konsilio (EKOSOK) de Unuiĝintaj Nacioj asignis al UEA la statuson de specialaj konsultaj rilatoj kun tiu plej grava monda organizo.

Same kiel Unesco, ankaŭ UN rekonsideris siajn rilatojn kun NRO-j por pliefikigi ilin. Oficiala statuso ĉe UN donas al NRO-j prestiĝon, sed por UN tio ne estas la motivo. Laŭ sia regularo UN postulas de la NRO-j, ke ili « apogu la agadon de UN kaj disvastigu la konon de ĝiaj principoj kaj aktivaĵoj ».

UEA havis konsultajn rilatojn kun UN ekde 1985, sed en 1997 tiu statuso estis ŝanĝita al t.n. listigita NRO. En tiu kategorio estas NRO-j, kiuj povas fari al UN nur « okazajn utilajn kontribuojn ». Kvankam en ĝi estis metitaj ankaŭ aliaj gravaj organizaĵoj, ekz. Internacia PEN, ĝi ne reflektas adekvate la fakton, ke UN-temoj estas por UEA ne nur okaza okupo sed UEA engaĝiĝas pri ili konstante. Freŝa ekzemplo estas la aprila homrajta simpozio en Ĝenevo. Sekve UEA pretiĝis ampleksan dokumentaron pri sia agado por la Komisiono pri NRO-j, por pravigi promocion al pli taŭga rango. Ĉeestante ĝian kunsidon la 26<sup>an</sup> de junio, estrarano Mark Fettes kaj UN-reprezentantino Rochelle Grossman ĝojis atesti senprobleman akcepton de tiu celo.

Estas du specoj de konsultaj rilatoj. Por NRO-j, kiuj okupiĝas pri plej multaj el la aktivaĵoj de UN, estas ĝeneralaj konsultaj rilatoj. Specialan konsultan statuson povas atingi

NRO — kiel UEA — kies agadtereno rilatas al parto de UN-aktivaĵoj.

Dank' al sia statuso, UEA rajtas ĉeesti kunsidojn de diversaj UN-organoj kaj en multaj kazoj interveni en diskutoj kaj fari proponojn. Kiel antaŭe, ĝi plu membras en CONGO, t.e. Konferenco de NRO-j — oficiala komuna organo de NRO-j havantaj konsultan statuson — kaj rajtas elektiĝi en ĝiajn gvidorganojn. Samtage, kiam Fettes kaj Grossman sekvis en Novjorko la traktadon de la promocieto de UEA, en Ĝenevo Andy Künzli, tiea UN-reprezentanto de UEA, ĉeestis kunsidon de la CONGO-estraro. [ *El Interredaktore* ]

## Ret-info : 500 !

László Szilvási

La 1<sup>an</sup> de julio estis dissendita la 500<sup>a</sup> mesaĝo pere de la retpoŝta Esperanto-novaĵservo *Ret-info*. Ĝi signifas mezume po 2.7 mesaĝojn tage (au po 4 mesaĝojn labortage). Per *Ret-info* distribuiĝas nur movad-rilataj informoj.

Pere de *Ret-info* estas distribuataj la gazetaraj komunikoj de UEA, kaj movadrilataj informoj el *Interredaktore*, NUN, SCE kaj aliaj retaj forumoj.

La aliĝo ne ligiĝas al kalendara jaro, iam ajn oni povas aliĝi por la sekva 12-monata periodo. (kotizo : 45 NLG, pere de UEA aŭ landaj kotizperantoj de *Eventoj*). Dankojn al pluraj aktivuloj, kiuj donacis aliĝon al siaj amikoj ! [ *El Interredaktore* ]